

I. F. E. A.
ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIARI ESPERANTISTI

Aderente: alla INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO FEDERACIO "I.F.E.F."; alla UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO "U.E.A."; e alla ITALA ESPERANTO FEDERACIO "F.E.I." (Ente Morale D.P.R.28-6-1956 n° 1720).

Sede Centrale: DOPOLAVORO FERROVIARIO - BOLOGNA.

INFORMA BULTENO = ITALA FERVOJISTO

Redazione: Via Donato Creti, n° 61 BOLOGNA (Italia) - Tel. 35.90.71.

N° 3 - 4

Marto kaj Aprilo 1964-a

14-a Jaro

LA GRANDANIMA KORO DE NIA PREZIDANTO ĈESIGIS SIAJN BATOJN

En la frua vespero de la 16-a de marto konsternis nin la telefona sciigo pri la subita morto de nia kara amiko:

Kavaliro Giuseppe ZACCONI

PREZIDANTO DE I.F.E.A. - PREZIDANTO DE LA BOLOGNA ESPERANTO-GRUPO "ACHILLE TELLINI" - EKS FUNKCIULO DE ITALA ŜTATA FERVOJO - EKS DIREKTORO DE LA PROFESIA LERNEJO ĈE CENTRA STACIDOMO EN BOLOGNA - DOCENTO DE ESPERANTO - VIC-DELEGITO DE U.E.A. POR LA URBO BOLOGNA - ORGANIZINTO DE LA NACIA KONGRESO DE ESPERANTO DUM 1952-A - PREZIDANTO DE L.K.K. DE LA 40-A UNIVERSALA KONGRESO (JUBILEO) DE BOLOGNA.

Nur malfacile la malĝoja signifo de tiu abrupta sortobato penetris en la cerbon de ni, kiuj dum jaroj en kompleta harmonio kaj en fidela amikeco kunlaboris kun li por la bono de nia fervojista movado.

Li estis preskaŭ 71-jaraĝa kaj dediĉis la tutan vivon al la familia amo, al sia profesia laboro kaj al la plej noblaj idealoj de la vivo kaj de nia Esperanto-Movado.

Homama animo, Li sin dediĉis al Esperanto dum longaj jaroj, kaj instruis nian karan lingvon ĝis lastaj semajnoj, malgraŭ la malpermeso de la kuracistoj, ĝis kiam lia forta fibro cedis kaj lia grandanima koro ĉesigis siajn batojn.

Ĉiam bonhumora, afabla, kaj bonintenca, lia sindono al nia afero havigis al Li multajn sincerajn amikojn en Italujo kaj eksterlande, en nia movado kaj ekster nia movado; kun ni ili funebras pro la forpaso de tre kara amiko, kiu per sia parolo kaj per sia ekzemplo stimulis multajn kolegojn al aktiveco kaj persisto. Pro lia mildeco kaj bonkoreco multegaj Esperantistoj en- kaj eksterlande nomis lin "Paĉjo Zacconi".

Li estis bonega organizanto de kongresoj. Ni rememoras la Nacian Italian Esperanto-Kongreson dum la jaro 1952-a kaj la 40-an Universala Kongreson de Esperanto (Jubileo) dum la jaro 1955-a, kiujn Li volis kaj organizis kun sindonemo kaj sperto. Pro liaj esperantistaj meritoj la Prezidanto de la Itala Respubliko distingis lin per ordeno de Kavaliro.

Ni kiuj konis lin ankaŭ en la familia vivo, komprenas ke lia forpaso estas terura bato por tiuj kiuj postrestas. Ni nur povas kolektiĝi kun kortuŝita amo kaj emociita silento ĉirkaŭ ilia doloro kaj esperi ke nia profunda partopreno iom mildigos ilian teruran vundon.

GERMANO GIMELLI

In occasione del Trigesimo, il giorno 18 aprile 1964 alle ore 17, verrà officiata una S.Messa nella chiesa di S. Carlo in Via del Porto, 3 BOLOGNA
Invitiamo tutti i "Samideani" a prendervi parte.

16-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO

Bruselo (Belgio), inter la 9-a kaj la 15-a de majo 1964-a

Vi estos ravita de Bruselo, via kongresurbo! Ĉefurbo moderna kun aŭdacplenaĵoj, ĝi estas ankaŭ la centro de arto kaj de kulturo.

En la impona kadro de ĝia Granda Placo, vi vidos la respeguligon de ĝia historio kaj de ĝia pompo. Urbo de internacia bonakcepto, Bruselo prezentas al vi sian komforton kaj sian abundon; sed ankaŭ la ĉarmon de neforgebla restado. Renkontopunkto de la grandaj fluoj de la kulturhistorio, Bruselo kunigis en siaj riĉegaj muzeoj nekontesteblan kaj netakseblan kolekton. La diverseco de la homa genio sin manifestas tie en ĉiuj esprimoj de la arto. Bonan vojaĝon al via kongresurbo. La Loka Kongresa Komitato.

ĜENERALAJ INFORMOJ: La Kongresejo estas do la BRUSELA CENTRA STACIO: naci-lingve oni diras: France: GARE CENTRALE, BRUXELLES-1; Nederlande: CENTRAAL STATION, BRUSSEL-1. Telefono: De la urbo: 18.60.50 (1001), Deĵore: 911.1001.

Ĉiuj kongresanoj loĝos en la tuja apudeco de unu el la kvin stacioj de la Brusela Nord/Sud ligilo, do sur maksimuma distanco de 5 km. de la kongresejo. Tio signifas ke ĉiu el vi loĝos trajne, trame aŭ aŭtobuse, maksimume je 10 minutoj de la kongresejo. La normala transportkosto, ĉu per trajno, ĉu per tramo, ĉu per aŭtobuso, estas por tiu trajekto 5 Fr. Sed ni esperas ke per via kongreskarto vi rajtos veturi senpage per la trajno dum la tuta kongressemajno. Proksimume ĉiun kvin minutojn veturas trajno el de la norda al la suda stacio kaj kontraŭe same. Do neniam vi devos atendi longatempe. En multaj belgaj trajnoj estas aŭtomate fermataj pordoj, kaj la haltoj estas tre mallongaj, ofte nur kelkaj sekundoj. Por la en kaj elirado de la trajnoj estu do jam antaŭe certaj pri viaj agoj.

POR VIA ALVENO EN BRUSELO: Malmultaj internaciaj trajnoj haltas en la Brusela Centra stacio pro la densega trafiko. La kongresantoj do devos ŝanĝi de trajno, ĉu en la Brusela Suda ĉu en la Brusela Norda stacioj.

Se vi havus malfacilaĵojn ĉu en la Norda ĉu en la Suda stacioj vi direktu vin al la informejo situata en la grandaj haloj tuj sub la alvenperonoj. De tie oni kontaktos por vi kun la kongresejo kaj oni eventuale vokos iun por veni helpi vin.

EKSKURSOJ

A - TUTTAGE EN LA ARDENOJ: Dato: Mardo 12-5-1964. Prezo: 300 Fr. enkalkulata la boatekskurso, la seĝlifto, la vizitoj, la tag- kaj vespermanĝoj. Trinkajoj ne enkalkulitaj. Ekskursvojo: Bruselo Centra stacio (8h)-Namur-Dinant-Suprenirado per seĝlifto al la fortikaĵoj-Vizitoj kaj promenado malsupren laŭ la grotoj-Tagmanĝo-Boatekskurso sur la riverego la Mozo al Waulsort-vizitoj-reveno trajne al Dinant-Libera vespero kaj vespermanĝo. Reveno en Bruselo je la 22h. haltoj en diversaj stacioj de la nord/sudlig.

B - TUTTAGE EN LIMBURGO: Dato: Vendredo 15-5-1964. Prezo: 300 Fr. enkalkulata la aŭtobusekskurso, la vizitoj al la bienegoj "Bokrijk" kaj "Bobbejaanlando"- la tag- kaj vespermanĝoj-trinkajoj ne enkalkulitaj. Ekskursvojo: Bruselo Centra stacio (8h)-Bokrijk-vizito de la bienego kun ĝia altvalora folkloro vivmaniero-tagmanĝo en la kastelo-Mol Atomcentro-Lichtaart-Sovaĝa kaj surpriza akcepto en la bienego Bobbejaanlando-vespermanĝo dum varia festprogramo kiu fermos la kongreson-reveno en Bruselo centra stacio je la 23h.-haltoj en diversaj stacioj de la nord:sudligilo.

C - DUONTAGA VIZITO DE BRUSELO: Dato: Pro la komplikaĵo por viziti la varmkulturejoj reĝaj kaj eventuala akcepto fare de la Reĝa Paro, la datoj de ĉi tiu ekskurso povos okazi ĉu lunde matene 11-5-64 ĉu ĵaŭde posttagmeze 14-5-64. Prezo: Senpage por la gekongresanoj kies kongreskarto estos validigita. Ekskursvojo: Bruselo Centra stacio-vizito de la fervoja muzeo-Jarcentpalacoj-Japana turo kaj templo-reĝaj varmkulturejoj-atomium-Belgio en unu vido-Kvindekjarpordego-de la mezepoka al la modernega Bruselo-reveno. LA EKSKURSOJ D- E- kaj F- OKAZOS JE LA SAMA DATO KAJ HORO SED LAŬ LA SAMA SITUACIO OL KLARIGATA POR EKSKURSO C-. ĈIU EL VI ELEKTU DO UNU EL ĈI TIUJ TRI EKSKURSOJ LAŬ SIAJ PERSONAJ EMO KAJ FINANCA EBLECO.

XXX-a KAJ JUBILEA KONGRESO DE LA INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA

"I.K.U.E. - Valencio (Hispanujo) de la 23-a ĝis la 29-a de julio 1964-a
En Valencio okazos ankaŭ la XXV-a Hispana Jubilea Kongreso de Esperanto
de la 21-a ĝis la 24-a de julio 1964-a.

Kongreskotizoj: Ĝis la 1-VI-1964: Kongresano: Hispanaj pesetoj 450. Edzi-
no de kongresano: H.p.225. Junul(in)o ne pli ol 20-jara kaj studentoj:200.

Loĝejoj: (Proksimumaj prezoj) Luksa hotelo: Ĉambro: 160-260 pes. 1 manĝo:
150 p.; Unuaklasa-A: Ĉambro: 135-165 p. 1 manĝo 125 p.; Unuaklasa-B: Ĉam-
bro: 100-120 p. 1 manĝo: 100 p.; Duaklasa: Ĉambro 60-80 p. 1 manĝo 85 p.
Triaklasa: Ĉambro 55-65 p. 1 manĝo: 65 p. PENSIONOJ: Unuaklasa: Ĉambro:60
p. 1 manĝo: 60 p.; Duaklasa: Ĉambro 40 p. 1 manĝo 45 p.

Manĝoj en Restoracioj: De luksa restoracio ĝis popola "taska": 200-12 pes.
Ankaŭ en la lastaj kategorioj la nutraĵo estas sufiĉe bona. Ĉiu kongresano
ricevos en la akceptejo kompletan liston de rekomendindaj restoracioj. Par-
toprenante ekskursojn la partoprenantoj povas manĝi en restoracio aŭ laŭ-
vole kunporti manĝaĵojn.

Instrukcioj: Sendu la aliĝilon al: Sekretariejo de la IKUE-Kongreso, Calvo
Sotelo, 11 VALENCIA (Hispanujo). Sendu samtempe la kotizon al: Viajes
Melià, Paz, 41 VALENCIA kun la indiko "Por la IKUE-Kongreso 1964". Ne sen-
du la mono al la Sekretariejo. Se vi bezonas aliĝilojn, mendu ilin ĉe:
Centra Oficejo de IKUE, 36 rue Etat-Tiers, LIEGE (Belgio).

IMPONA PARTOPRENO DE ESPERANTO EN GRAVA KATOLIKA CEREMONIO EN ROMO

Kiel ĉiujare ekde 1949-a ankaŭ nunjare esperanto partoprenis en la tiel no-
mata "Sermono de la Nacioj" en la granda preĝejo de S. Andrea della Valle
en Romo, kie geknaboj el la diversaj landoj omaĝas al Infano en siaj naciaj
lingvoj. Malfermis kaj fermis la ceremonion tridekok knabinoj de la Ŝtata
mezgrada lernejo "Col di Lana", sub direktado de Prof-ino Silvina De Alex-
andris, ili kantis ĉe la komenco la tradukon en Esperanto de la fama lul-
kanto "Paca Nokto", kaj ĉe la fino, preĝon de la tutmonda infanaro por la
Paco, verkitan por la okazo de Prof-ino Adelaide Antonelli Kohler, kiu in-
struas Esperanton al siaj lernantinoj en la supredirita lernejo.

Kiel simbolo de la universaleco de la preĝo kaj de la lingvo, antaŭ la
unua vico de la kantanta ensemblo staris kvin geknabetoj, reprezentantajn
la kvin kontinentojn, kies nomo estis klare videbla sur granda rubando, or-
namanta la bruston de la koncerna reprezentanto. Granda Esperanto-flago
kun la nomo de la internacia lingvo restis antaŭ la altaro, larĝe etendita
inter du stangoj dum la tuta ceremonio, kaj super la esperantistaj knabi-
noj dum ilia kantado.

Al la multnombra ĉeestantaro, tute pleniganta la vastan preĝejon, prezen-
tis la ensemblon la lernantino Anna Maria Facenda, per klariga paroladeto
en la itala lingvo, kies traduko estas: "En la internacia lingvo Esperanto,
havanta ĉe sia origino kaj en la koloroj blanka kaj verda de sia flago la
esperon de frateco kaj la aspiron al la paco, bazita sur tiu frateco, ni
nun petegos de Infano Jezuo la pacon. Ni konsideras al ni ideale kunigitaj
la infanojn de la tuta mondo, kiun kvin el ni, originaj el la kvin kontinen-
toj, estas elektitaj por reprezenti. En ĉi tiu jaro de la Koncilo kaj de la
Pilgrimado de nia Pontifiko al la Sanktaj Lokoj, leviĝas fido plena nia pre-
ĝo, verkita de nia Esperanto-instruistino ĝuste por ni kaj por ĉi tiu Ser-
mono de la Nacioj laŭ la notoj de la lulkanto de Brams. Por ke, ĝin aŭskul-
tante, vi povu nin sekvi per la koro, ni donas al vi ĝian tradukon al Ita-
la lingvo".

La saman vesperon la radio detale raportis pri la ceremonio, evidentigan-
te la partoprenon de la knabinoj, kiuj kantis en Esperanto.

Rinnovate la quota per il 1964 = Sostenete l'I.F.E.A.

LUMBILDOJ PRI VOJAĜO AL LA SANKTA LANDO DE JESUO

Nia membrino Prof-ino Rosa Maudente, el Bologna, invitita de D-ro Carlotto, Prezidanto de Sendependa Kultura Movado, faris paroladon kun lumbildoj en Aprilia. Kompreneble ŝi ne forlasis la okazon por montri kiom Esperanto taŭgis al ŝi dum ŝia dufoja vojaĝo al la Sankta Lando de Jesuo, kaj kiom taŭgas al ĉiuj la internacia neŭtrala lingvo, precipe en orientaj landoj, kie la lingvoj de la nacioj iam regantaj ekmalaperas aŭ kiujn oni ne ŝatas aŭskulti.

BELEGA BROŜURO "BONVENON AL OSLO"

Jam la kvinan fojon la Turisttrafika Asocio de Oslo kaj Ĉirkaŭaĵo eldonis turistbroŝuron en Esperanto. Ni plezure ricevis du ekzemplerojn de la ĵus aperinta broŝuro, kiu estas presita en 10.000 ekzemplerojn.

La belaspekta dukolora broŝuro estas titolita "Bonvenon al Oslo-La ĉefurbo de Norvegujo". Krom belegaj fotoj la broŝuro enhavas la jenajn ĉapitrojn: La libertempa urbo Oslo-Ĉiuj vojoj kondukas al Oslo"-Vidindaĵoj en Oslo-La ĉirkaŭaĵo de Oslo-Oslo kiel Banurbo-Rondveturoj-Iom pri Restoracioj.

La broŝuro estas senpage ricevebla de Norvega Esperantista Ligo, Boks, 942 Oslo (Norvegujo. Ni esperas havi la eblecon sendi tiun belegan broŝuron al nia legantaro kune kun la proksima numero de "Informa Bulteno-Itala Fervojiŝto".

KAMPANIO "LAZURO"

Mezlerneja Fako de la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Junularo starigis kaj gvidis kampanjon "LAZURO"-n. La kampanjo nomiĝas "Lazuro" ĉar tiu ĉi koloro simbolas unuecon de tuthoma familio kaj unuecon de ĝiaj fundamentaj intereso, kaj krome estas ankaŭ akceptita en la emblemo de O.N.U.

La kampanjo koneksas al rezolucio akceptita dum la XV-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de ONU (1960), pritraktanta rimedojn celantajn al disvastigo inter la junularo pacideojn, reciprokan estimon kaj kompreniĝon inter la popoloj kaj rekomendanta disvastigon de libera interŝanĝo de opinioj inter la diversnacia junularo. La kampanjo LAZURO koneksas ankaŭ al rezolucio akceptita dum 11-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESCO, kiu rekomendas plintensigon de klopodoj en la sfero de unuigo de edukaj celoj kun principoj de tolerado, plena objektiveco kaj zorgo pri konservo de pacaj rilatoj inter la nacioj kaj rasoj.

La Fako de Mezlernejoj ĉe Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Junularo (ul.DU-BOIS, 3 WROCLAW-Pollando) volonte korespondas kun ĉiuj personoj interesitaj pri la problemaro de la Kampanjo "LAZURO".

ESPERANTO EN LA RADIO

RADIO ROMA - ESPERANTO FAKO - Casella Postale 320 ROMA (Italia)- DISSENDOJ EN ESPERANTO, JARO 1964-a. La dissendoj okazas de h.19,55 ĝis h.19,10 (MET) Ondlongoj: m.31,33=Mc/s.9,57; m.41,24=Mc/s.7,27; m.50,34=Mc/s.5,96.

Prelegantoj: marde kaj merkrede: S-ro Luigi Minnaja - vendrede: Prof. D-ro Vincenzo Musella. - ĉiujn merkredojn: Kuriero de Esperanto.

APRILIO 1964-a: mardon la 14-an: Novaĵo el Italujo- vendredon la 17-an: La italaj insuloj Procida kaj Ischia- mardon la 21-an: Italaj kanzonoj en Esperanto- vendredon la 24-an: Italujo kaj fremdaj verkistoj: W.Shakespeare- mardon la 28-an: Leterkesto.

MAJO 1964-a: vendredon la 1-an: La Unua de Majo- mardon la 5-an: Tra la literaturo- vendredon la 8-an: Mondfama itala pedagogiistino: Maria Montessori mardon la 12-an: Novaĵoj el Italujo- vendredo la 15-an: La Tago de bonvolo- mardon la 19-an: Italaj kanzonoj en Esperanto- merkredon la 20-an: Kuriero de Esperanto- vendredon la 22-an: Malkovrindaj insuloj- mardon la 26-an: Leterkesto- vendredon la 29-an: Italaj humanistoj: Angelo Poliziano.

La Fakestro: L. MINNAJA